



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 26/1973 31 okt 1973
Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi jam havas "JUNAN AMIKON"?

Jus aperis N-ro 1/1973 de la revuo
por lernantoj kaj
komencantoj
Prezo 1,- GM
Mendu ĉe Ludwig
Pickel, Nürnberg

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Ĉiusemajnaj Esperanto-elsendoj el Vieno

Vieno (pp) La Aŭstria Esperanto-Instituto informas:

Krom la jam kutima kaj en la ĝisnuna maniero daŭrigota mezonda programo "Esperanto-Nachrichten" Radio Wien ORF elsendos ekde la venonta semajnfino, t.e. la 3an kaj 4an de novembro 1973, per mal-longondo ĉiun sabaton kaj dimanĉon po dekminutan Esperantlingvan programon.

La unuaj kvin minutoj konsistos el novaĵoj elektotaj de la Radio-instanco mem, la restaj kvin minutoj el raportoĵ verkitaj de niaj propraj kunlaborantoj.

Jen la programskemo:

Ĉiusemabate 17,45 - 17,55 h 6155 kHz (49 m) por Eŭropo
17780 kHz (16 m) por Aŭstralazio
Azio sudorienta

Ĉiudimanĉe (Ripeto de la sabata programo)

6,45 - 6,55 h 6155 kHz (49 m) por Eŭropo
7250 kHz (42 m) por Eŭropo sud-orienta
Tempo-indikoj laŭ 12705 kHz (25 m) por Aŭstralazio
Mezeŭropa Tempo! Azio sud-orienta

Alterne en ĉiu programo parolos, laŭ antaŭvideblo, Emil Vokal kaj d-ro Karl Beckmann.

Tiu en niaj malfacilaj cirkonstancoj atentinda paŝo antaŭen estas frukto de longdaŭra, nelacigeblan paciencon postulinta penado fare de la Aŭstria Esperantista Federacio.

Adreso por alskriboj al la Aŭstria Mallongonda Servo:

ORF Wien, Dr. Alfred Macher, Argentinierstr. 30a, A-1040 Wien

Aŭskultu kaj nepre skribu al la nova Esperanto-radiostacio!

Por ke homo komprenu homon

Esperanto-filmo en la Pola Televido

Varsovio (pp) Dimanĉe, la 28 okt 1973, je la 15,55 h okazis la "granda evento" en la Pola Televido, la Programo. La kolora filmo pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof sub la titolo "Aby człowiek rozumiał człowieka" (Por ke homo komprenu homon) estis por la unua fojo sur la ekrano kaj laŭ la recenzo de la Esperanto-redakcio de Pola Radio bone impresis la spektantojn. La filmo, kiu daŭras 35 minutojn, estis anoncita en la radio-programo de la revuoj kaj gazetoj, kiel montras la eltranĉaĵo el Trybuna Ludu de la 28.10.73. Sekve de la filmo jam lunde homoj venis al telefonis al la sidejo de Pola Esperanto-Asocio en Jasna 6, por pli detale informi pri Esperanto. La Esperanto-versio de la filmo baldaŭ estos preta kaj mendebla.

Niedziela, 28.X.

PROGRAM I

15.55 - (kolor) „Aby człowiek rozumiał człowieka” - reportaż filmowy



**PARTITO
SOCIALISTA
DEMOCRATICO
ITALIANO**

Sezione Italiana dell'Internazionale Socialista

DIREZIONE
UFFICIO INTERNAZIONALE

Roma, 28/5/74
Tel. 6737851

Al ĉiuj socialismaj partioj
aliĝintaj al la Internacio

Temo: Esperanto.

Problemo tre grava je internacia nivelo, kiu, ĝis nun, strange neniam estis alfrontita en la sino de la Socialisma Internacio, estas tiu de adopto de komuna helpa lingvo por la socialismaj partioj kaj la mondo de l'laboro.

Unuiga lingvo por la popol-amasoj ŝajnas, ja, necesa por konkrete realigi la socialismajn principojn pri frateco, solidareco kaj internacia organizo.

Por eviti maljustajn discriminaciojn (je daŭra avantaĝo de la favorata popolo kaj je daŭra malavantaĝo de ĉiuj aliaj), ni opinias, ke tiu helpa lingvo povas esti neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj: tial, nia partio iniciatis proponon al la Socialisma Internacio, por adopto de la lingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj.

La Ĝenerala Sekretario Hans JANITSCHKE komunikis, ke li submetos tiun temon al la ekzameno kaj pridiskuto de la Buroo de Internacio en unu el la venontaj kunvenoj.

Nia Partio jam prezentis al la itala Parlamento legproponon por enkonduko de la instruado de Esperanto en la italajn lernejojn: ni proponas, do, ke ankaŭ aliaj socialismaj partioj prezentu similiajn proponojn al la koncernaj Parlamentoj.

Ni opinias, ke kunordigo de la iniciatoj estas esenca, aparte inter la socialismaj Partioj de Eŭropa Ekonomia Komunumo: la adopto de komuna supermacia lingvo favorus, ja, la naskiĝon de eŭropa konscio ĉe la Eŭropaj popoloj, kiu certe estus utila celo al politika unuigo.

Ni ŝatus koni vian opinion koncerne la menciitan temon.

Vladimiro Mihelj

Itala Iniciato

La Itala Socialdemokrata Partio en printempo sendis al ĉiuj partioj aliĝintaj al la Socialista Internacio Esperantlingvan leteron pledante por adopto de la internacia lingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj.

Por ke la letero havu sekvojn, esperantistoj kaj speciale partianoj devus nepre kontakti la koncernajn partiojn kaj laŭeble transsendi al multaj partiaj instancoj nacilingvan tradukon de la letero.

17a Skiferio

La tradicia skiferio esperantista, kiu ĉiuvintre disvolviĝas en Adelboden de la 26 dec - 5 jan, estas ĉiurilate altnivela renkontigo, kie la krockilado absolute forestas. Pro tio multaj esperantistoj ne nur lertiĝas en la skiarto venante al Adelboden, sed ankaŭ en la arto paroli Esperanton.

Ĉi-vintre jam okazos la 17a skiferio. Dank' al la ĉeesto de talenta profesoro la skilertuloj ankoraŭ plilertiĝas kaj kiel ĉiujare pluraj partoprenantoj komencos intimiĝi kun la skiarto. Adelboden troviĝas en Berna Oberlando (Svislando) je alteco de 1400 m. La restado disvolviĝas en grupa kaj hejmeca etoso en sufiĉe komforta ĉaledo. Petu informojn de Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314 La Sagne.

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

Budapeŝto (pp) Unu jaron post apero de la provnumero nun estas havebla la 1a numero de la revuo "Juna amiko", kiu ne nur taŭgas por lernantoj, sed ankaŭ por plenkreskulaĵoj komencantoj pro sia facila legaĵo. La aliaj du numeroj aperos en januaro kaj aprilo 1974. La abonprezo por ĉiuj tri numeroj estas 3 GM, sed haveblas ankaŭ nur la unuopaj numeroj por 1 GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, pagante la koncernan sumon al PSchK Nürnberg 819 56- 851.

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Prof. D-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA, konforme al la unuanima decido de la Komitato de UEA, farita dum la Universala Kongreso en Madrid 1968, estas denove unu el la kandidatoj por la premio de UN pri Homaj Rajtoj. Aparta komisiono de UN distribuos premiojn pro meritoj por laboro sur la kampo de Homaj Rajtoj okaze de la 25jara datreveno de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj en decembro 1973.

Andrzej Pettyn, Varsovio, ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio, en letero de la 24 okt 73 al Ludwig Pickel informas, ke en polaj gazetoj ĉiam pli ofte aperas informoj prenataj el "PILO-PRESS". Regule kaj konstante aperigas tiajn informojn "Ilustrowany Kurier Polski" eldonata en Bydgoszcz.

Pastoro T. Ilmari Haapalainen, finna himnologo, antaŭ kelka tempo laboris plurajn tagojn en germanaj bibliotekoj, i.a. en München kaj Wolfenbüttel. Dum laborpaŭzo li vizitis sian kolegon pastoro Burkhardt en Bissingen/Teck kaj partoprenis aktive en duhora ekzercado de la loka preĝeja ĥoro. Esperanto tute sentrude servis kiel sola interkomprenilo por interŝanĝi instrukciojn inter la du - ĥorestro kaj pianisto.

Reginald C. Bedford, brita estrarano de Kristana Esperantista Ligo Internacia, survoje al UK en Beograd, haltis en Bissingen/Teck kaj partoprenis tuttagan ekskurson de la supre nomita ĥoro. Denove la Internacia Lingvo uzigiĝis sentrude dum la tuta tago, kaj videble vekigis inter la membroj scivolo.

Caroline Rabe, la tre aktiva kaj ŝatata sekretario de la Esperanto-Klubo Munkeno, post kirurga operacio mortis en la aĝo de 75 jaroj la 17an de oktobro 1973.

Kalendaroj el Gechingen

Gechingen (pp) En la sama prezento kiel en antaŭa jaro aperos en la Reinsteg-Verlag Gechingen la du konataj kalendaroj.

Tierkalender 1974 (Bestkalendaro) Formato 30 x 42

Prezo inkluzive de afranko kaj pakumo

1 ekz. 5,- GM, 2 ekz. 8,50 GM, 10 ekz. 37,- GM

Kolora Florkalendaro 1974 Formato 29 x 30

Prezo inkluzive de afranko kaj pakumo

2 ekz. 5,- GM* 10 ekz. 18,- GM *unuopaj ekzempleroj ne haveblaj pro la altaj sendkostoj

Pagojn sendu al Helga Dingler, Kasistino, 7261 Gechingen, Uhlandstr. 8, Postscheckamt Stuttgart 180815-702

Esperanto-Revuoj 1974

Abonu nun: Germana Esperanto-Revuo

12,- GM

13,- GM (por eksterlandaj abonantoj)

Heroldo de Esperanto

23,- GM

Pagu al Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

PSchK Nürnberg 819 56-851

Esperanto laŭ amuz-metodo

Varsovio (PEA) Ankoraŭ ĉi-jare en la komenco de novembro aperos 2a eldono de la populara legolibro kun ekzercoj "Esperanto laŭ amuz-metodo" de Andrzej Pettyn. La legolibro aperos en la kvanto de 3000 ekzempleroj kaj ĝi estas mendebla pere de "Ars Polona", Varsovio, Krakowskie Przedmieście 7, Pollando, aŭ pere de la Libro-Servo Ludwig Pickel, Nürnberg, kiu estas en kontakto kun "Ars Polona".

Libromendoj el Pollando

Varsovio (PEA) La Ĉefa Estraro de PEA (Pola Esperanto-Asocio) en la komenco de oktobro mendis de diversaj Esperanto-eldonejoj en Bulgario, Hungario, GDR, GFR, Belgujo, Sovetunio kaj Jugoslavio 5000 ekzemplerojn de diversaj Esperanto-eldonaĵoj. I.a. oni mendis ĉ. 200 librojn ĉe Ludwig Pickel Eldonejo, nome Enkonduko en la libroscienco de Esperanto de Hauptenthal kaj la Mondpercepto de la modernaj natursciencoj. Oni mendis krome jarkolektojn de IPR. Plej multe da ekzempleroj oni mendis de la nove aperonta libro "Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz, nome 1000 ekzempleroj. La libro aperos en GDR.



La semajno en la radio

Laŭ la ĝojiga informo sur la titola pago ni esperas, ke en la venonta numero ni povos ankaŭ skribi pri la unua Esperanto-elsendo de ORF Wien. Romo. La dimanĉaj elsendoj nun estas bonege aŭdeblaj. La Kuriero de Esperanto ĉefe traktas lingvoproblemajn aspektojn, i.a. oni citis el gazeta artikolo de itala publicisto, kiu diris pri la babela turo, ke ne la lingvo de la estroj, sed tiu de la laboristoj kaj masonistoj estis konfuzita. La novaj ondolongoj de Romo nun estas 39m, 42,21 m, 50.08 m. Zagrebo Ĉi-foje la Zagreba leterkesto ne estis tre plena. Mankis ankaŭ recenzoj pri jugoslaviaj revuoj, ĉar dum oktobro neniu aperis. Oni informis pri la aŭdienco ĉe prezidento Heinemann kaj menciis la artikolon pri la taskoj de fakaj asocioj de d-ro W. Bormann. En la mencio de Pilo-Press oni ankaŭ konstatis, ke ne mankas spritaĵoj en la formo de Radio Bervalio respondas... Ĉu la Esperanto-redakcioj respondu principe skribe al la korespondaĵoj de aŭskultantoj? Laŭ Zagreba opinio, tio ne necesas. La respondoj okazu per la radio! Berno. Post Regulo-Perez, ĉefo de Stafeto, nun mikroфона gasto ĉe Radio Berno estas d-ro Tazio Carlevaro, kiu i.a. parolis pri Psikiatrio kaj Lingvistiko. D-ro A. Baur prelegis pri la svis-germana vortaro. Pekino. Se alproksimiĝas la elsendotempo de Pekino ekestas interna batalo por germana aŭskultanto. Ĉu restiĉela pli aŭ malpli aloga televida programo aŭ aŭskulti al Pekino? La 21a horo vere ne estas konvena tempo. Varsovio La kongreso de la pacfortoj en Moskvo kaj la armistico en Proksima Oriento kaj la ĉi-koncernaj elpaŝoj de Edward Gierak plurfoje aŭdiĝis en la politika programo. La Esperanto-Ekspresso disaŭdiĝis tri intervjuojn, nome kun Regulo Perez pri libroeldona agado, kun Michel Duc Goninaz pri la E-literaturo, kaj kun Gorgen Sevak, lingvisto el Erevano. Li informis, ke aperis la unua E-libro en Armenio, kiu estas senpage havebla ĉe Gorgen Sevak, Poŝtkesto 78, Erevano, Sovet-Unio.

Konsolo de veterano:

Fine li kriis sian unuan Esperanto-vorton. Mia vivo-tasko do estas plenumita.

En la mencio de Pilo-Press oni ankaŭ konstatis, ke ne mankas spritaĵoj en la formo de Radio Bervalio respondas... Ĉu la Esperanto-redakcioj respondu principe skribe al la korespondaĵoj de aŭskultantoj? Laŭ Zagreba opinio, tio ne necesas. La respondoj okazu per la radio! Berno. Post Regulo-Perez, ĉefo de Stafeto, nun mikroфона gasto ĉe Radio Berno estas d-ro Tazio Carlevaro, kiu i.a. parolis pri Psikiatrio kaj Lingvistiko. D-ro A. Baur prelegis pri la svis-germana vortaro. Pekino. Se alproksimiĝas la elsendotempo de Pekino ekestas interna batalo por germana aŭskultanto. Ĉu restiĉela pli aŭ malpli aloga televida programo aŭ aŭskulti al Pekino? La 21a horo vere ne estas konvena tempo. Varsovio La kongreso de la pacfortoj en Moskvo kaj la armistico en Proksima Oriento kaj la ĉi-koncernaj elpaŝoj de Edward Gierak plurfoje aŭdiĝis en la politika programo. La Esperanto-Ekspresso disaŭdiĝis tri intervjuojn, nome kun Regulo Perez pri libroeldona agado, kun Michel Duc Goninaz pri la E-literaturo, kaj kun Gorgen Sevak, lingvisto el Erevano. Li informis, ke aperis la unua E-libro en Armenio, kiu estas senpage havebla ĉe Gorgen Sevak, Poŝtkesto 78, Erevano, Sovet-Unio.